Universala Esperanto-Asocio

KAPABLIGO :
INSTRUISTA TREJNADO
Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO 2018-06 sendita el Budapeŝto, la 25an de marto.

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# ILEI ne povas neglekti Afrikon

Teksto de la prezidantino de ILEI


Nia instruista ligo ILEI preparis kaj lanĉis du programojn por Esperanto Instruista Trejnado EIT (vidu novaĵojn en http://www.ilei.info/) :

- Reta Instruista Trejnado de Esperanto (RITE) plus MADRIDO
- Reta Instruista Trejnado de Esperanto = RITE plus KOTONUO

Aperis ĉe UEA gazetara komuniko pri tiuj projektoj. Per simpla peto al la Centra Oficejo eblas ricevi tiujn komunikojn. La plena kolekto estas legebla ĉe: https://uea.org/aktuale/komunikoj

Sekvas koncizigita informo de la prezidantino de ILEI:

**Konstato**: pluraj ne afrikanoj partoprenis la 6an Afrikan Kongreson en Bunda, Tanzanio (vidu en revuo *Esperanto*, jan kaj feb 2017) kaj/aŭ la kongreson de la junuloj IJK en Aneho, Togolando, en julio 2017. Ili emfazis, kiom bone afrikanoj parolas nian lingvon kaj esprimis sian admiron pri tio.



**Konstato** reage al la anonconpri ebloj de Esperanto Instruista Trejnado (EIT) aŭdiĝis voĉoj el Afriko: 'kiel ni povos partopreni….?' Fakto estas, ke afrikanoj ne ricevas vizon al Eŭropo (Hispanio membras en la *Schengen*-zono). Fakto estas, ke por ĉiuj la vojaĝo estus ege kosta.

Do ILEI esploris pri solvo, kaj trovis, danke al la preteco de d-ino Katalin Kovats, kiu konsentas sekvi la lernadon retan (RITE) de plia dudeko da ontaj diplomitaj Esperanto-instruistoj. La solvo nomiĝas «RITE plus KOTONUO»

Jen prezento de du partoj de la lertigado-programoj:

- Reta instruista trejnado kun lernado, taskoj, kontrolo fare de Katalin Kovats kaj Mireille Grosjean. Tiu parto povas tuj komenciĝi. La studentoj devas povi labori proks. 6-8 horojn semajne. La fino de ĝi devos okazi ĝis la 30-a de septembro 2018. La kostoj de tiu parto por partoprenantoj loĝantaj en Afriko estas 80 EUR.
- Surloka plensemajna kurso en Kotonuo, Benino, en Hotelo JOCA, organizota de la NRO «Scio Sen Bariloj (SSB)»kaj gvidota de la prezidanto de ILEI. Datoj: 4-11 novembro 2018. Esperebla dudeko da personoj aliĝos kaj venos al Kotonuo el Afriko aŭ aliaj mondpartoj.

Tranoktoj kaj po tri manĝoj tage dum plena semajno en hotelo JOCA kostas entute por unu persono 170 EUR. SSB klopodos arigi donacojn unue por kovri la ĝeneralajn kostojn de tia organiza laboro kaj due por subteni la partoprenantojn, kiuj devos mem trovi 80 EUR por la reta kurso kaj 170 EUR por la forte rabatita restado en Kotonuo kaj la vojaĝkostojn.



**Alvoko al afrikanoj**: pripensu pri ŝparado, kolekto de mono ĉe viaj plumamikoj kaj multaj kontaktoj.

**Alvoko al norduloj**: Bonvole uzu la UEA-konton de SSB assb-k por subteni tiun unikan eblon por niaj plej elstaraj afrikaj gesamideanoj fariĝi diplomitaj Eo-instruistoj!

Vi povas sendi monon kun indiko: «Por EIT en Kotonuo; mi volas subteni la personon X aŭ Y» aŭ sendi monon por la ĝenerala kaso de EIT en Kotonuo. La organizantoj esploras pri repagsistemo cele al motivado de la plej diligentaj gestudentoj.
ILEI tie provos organizi ankaŭ lingvajn ekzamenojn. Do la plej diligentaj kaj bonaj lernantoj povos akiridu diplomojn okaze de tiu grava evento.

Pri «Scio Sen Bariloj» bv legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Scio_Sen_Bariloj
Pri la hotelo kaj kulturcentro JOCA bv legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/JOCA
Pri RITE plus KOTONUO, vidu ĉe: www.ilei.info

ILEI kaj edukado.net devos pripensi pri lertigado EIT en Ameriko kaj Azio en 2019.

Mirejo Grosjean (sur la foto donanta intervjuon al radio-stacio).

# Poŝtkarta vidigo de nia tutmondeco – se vi reagos!

Mi nomiĝas Dominique Baron kaj loĝas en Tours, Francio. Mi instruas Esperanton en la kolegio, ene de la Instituto Notre-Dame La Riche al 4 junaj knaboj. 3 havas 11 jarojn kaj 1 havas 13 jarojn. Ili estas komencantoj. Vidu foton en la PDF. Por ke ili sciu, ke Esperanto estas vere internacia, mi petas vin, se vi bonvolas, sendi al ili poŝtkarton de via lando. Tiamaniere, ankaŭ la tuta Instituto scios pri Esperanto.

Institution Notre Dame La Riche
à l'attention de Dominique BARON
30 rue Delpérier
B.P. 5813
FR-37058 Tours Cedex 1, Francio



Vortoj = 675

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.